THÉOPHILE CART



Trafendita Turo

TRAFENDITA TURO

LEGENDO

En ia provinco de Sudfrancujo ekzistas turo trafendita de supro ĝis malsupro. Oni nomas ĝin: *la trafendita Turo* aŭ *Turo de Geno* (france Guenes aŭ Ganelon). Ok tagojn post la malvenko de Rolando en Roncesvalo (france Roncevaux), la perfida Geno havis en sia kastelo grandan festenon. Lian perfidon neniu ankoraŭ konis. Karlo Grando tamen suspektas Genon. Enirinte subite en la manĝohalon, li demandas lin pri la morto de sia nevo kaj malkovras lian krimon.

De kiam mortis apud Roncesvalo
Roland, nev' de blanka Karlo Grand',
okfoje kovris teron noktvualo;
sed Karlo venĝos morton de Roland'.

En antikva kastelo multa franca nobelo
estas gasto de Geno perfida.
Falis ja Sarazeno, bruas do la festeno.
Franco kantas kaj trinkas avida.

Fluas vin' en pokalojn, ĝojiganta vasalojn,
kiuj brave batalis por Kristo.
Ĉirkaŭportas manĝaĵon, prezentadas frandaĵon
multa lerta, agema servisto.

Inter brua senordo malfermiĝas la pordo
larĝa, alta, kaj l'Imperiestro
nun aperas en gloro, dum lumigoj el oro
klarheligas la halon por l' Estro.

Sekvantaro solena akompanas lin plena
je herooj. La gastoj de Geno
ĉe la vido de l' reĝo tuj leviĝas de seĝo.
Perfidulo nur sidas en ĝeno.

Fore sidas silenta : sed la reĝ' ne kontenta
malrapide aliras tuj Genon ;
lian brakon prenanta, kiel estro premanta,
Karlo diras, tre grave, la jenon :

— Silentiĝas vasaloj kaj servistoj en haloj —
« Kie estas Rolando nev' mia ? »
Perfidulo rediris : « Reĝ', al Dio li iris. »
— Ĉie regas silento glacia. —

Karl' parolas kun voĉo de severa riproĉo :
« Kie estas Rolando karega ? »
Staras Gen' sen koloro : « Mi ne scias, Sinjoro. »
Tion aŭdas reĝ' ankaŭ palega.

Li denove protestas : « Diru min, kie estas
nevo, kiun en koro mi portis ? »
Gen' respondas : « Nenion scias mi, se nur tion,
ke laŭdir' en batalo li mortis. »

« Do certigu per ĵuro sankta, je la ĉefturo
de l' kastelo, ke vi ne perfidis
kontraŭ dolĉa Rolando, plej fidela en lando ;
ĉar malamo vin ĉiam dividis. »

La turego kastela forta staras kaj bela.
Tial Gen' : « Antaŭ Krist' mi atestas,
(ho malpia la vorto !) je tur' mia, pri morto
de Rolando senkulpa mi estas. »

Tuj ektremas la mondo, — de Krist' estas respondo, —
terurplena bruego aŭdiĝas.
La ĉeftur' de l' kastelo, de l' tegmento ĝis la kelo.
nevidebla per glavo fendiĝas.

Surgenuen sin ĵetas Gen'. Pardonon li petas.
Sed memoras reĝ' karan Rolandon :
sur la kamp' Roncesvalo mortis li en batalo,
defendante dolĉegan Franclandon.

Por lin venĝi la reĝo perfidulon, laŭ leĝo,
alnajligis sur krucon. La turo
ĝis nuntempo vidiĝas, *trafendita* nomiĝas
je memor' de malpia la ĵuro.

De kiam mortis apud Roncesvalo
Rolando, nev' de blanka Karlo Grand',
okfoje kovris teron noktvualo ;
Sed Karlo venĝis morton de Roland'.

Imprimerie Espérantiste V. Polgar-Politzer, 33, rue Lacépède, Paris.

VENDATA POR LA BLINDULOJ

☆☆

NOTETO

PRI LA

RITMO DE L'POEMO

Unua kaj lasta strofoj

././/././/.

Ceteraj strofoj

../../. ../../.

../../../.

III B
t 3

PARIS
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, rue Lacépède 33